

# LA KVINA KONGRESO

## Impresoj de kongresano.

La grava raporto pri la « Floraj Ludoj », kiu aperis en la lasta numero de *La Revuo*, ne ebligis, ke ni parolu pri la tuta Kvina Kongreso.

Multaj gazetoj jam plej detale pri ĝi parolis, niaj lertaj kunlaborantoj Gebaronoj de Ménil kaj S<sup>o</sup> Aymonier rakontos la ĉefajn okazintaĵojn, mi do nur rapide liveros ĉi-tie kelkajn impresojn.



Ĉu tiuj impresoj estis bonaj?

Mi sentime respondos : « Jes, Jes! »

Kiam en lastaj tagoj de Julio la gazetoj subite anoncis la revolucion en Barcelono, kiam ni eksciis, ke la fervojoj estas rompitaĵoj, ke nek la poŝto nek la telegrafo funkcias, ke unuvorte Barcelono, kvazaŭ sieĝita urbo, estas apartigita de l' resto de l' mondo, granda timo nin ekkaptis. Kio fariĝis en la turnovento niaj karaj amikoj? Kio fariĝos nia tiel esperdona kongreso?

De ĉiuj flankoj ni ricevis leterojn de samideanoj, petantaj, ke ni tuj improvizu kongreson en Parizo; kaj, sub la premo de la petoj, mi malgaje laboris por ĉion prepari.

Mi diras « malgaje », ĉar efektive mi unuflanke tre bone sentis, ke, malgraŭ la granda servemo, la disĉiplinema agemeco kaj la nelacigebla fervoro de niaj Parizaj Esperantistoj, ni nur povos fari ion duonepretan, vere malindan de nia granda ĉefurbo; kaj, aliflanke, jam de kelka tempo mi revis, ke la *deka kongreso* de Esperanto okazos en Parizo, ke per zorga antaŭpreparo kaj energia laborado, ni povos organizi en nia franca mondurbo, por 1914, ion grandiozan ne ankoraŭ viditan, kaj tiel, se hazarde ni devus transloki la kvinan kongreson en Parizon, mia espero estus ruinigita.

Mi tamen laboris, opiniante, ke ĉiuj privataj deziroj, eĉ plej laŭdindaj, devas esti oferitaj por la bono de nia afero.

S<sup>o</sup> Liard, la eminenta rektoro de l' Pariza Universitato, cedante je mia peto, bonvolis meti je nia dispono la tutan « Sorbonne », la faman « Grandan Amfiteatron », kiu povas enteni pli, ol 4000 personojn, kaj tiom da aliaj amfiteatroj kaj salonoj, kiom estus necese. Mi faris interkonsentojn kun hotelestroj kaj restoraciestroj; eĉ estis jam planoj por ekskursoj, en kiuj la aeroplanoj ne estis forgesitaj!

Feliĉe, feliĉe ĉio tio estis vana!

Baldaŭ alvenis leteroj de nia amiko Pujulà, kiu certigis, ke li ne ĉesis

labori por la Kongreso eĉ unu minuton, kaj ke ĉio estos baldaŭ retranskribita. Nia fervora samideano Alfonso Sabadell, timante nek la teruran varmecon nek la lacigon de longa veturado, tuj vojaĝis, kiam eble, al Madrido, kaj fine, la 7 de Aŭgusto, telegramo sciigis al ni, ke la hispana registaro firme garantiis, ke la Kongreso povos okazi, konsente, ke ĉiuj strataj eksteraj manifestacioj estu elstrekitaj el la programo.

En la entuziasma artikolo, kiun mi verkis post mia antaŭkongresa vojaĝo al Barcelono, mi anoncis grandiozan solenan akcepton de Zamenhof en la stacidomo, kamparan meson, publikajn dancojn sur placo, tagan iluminadon de l' Tibidabo, kaj aliajn eksterdomajn festojn.

Nenio el ĉio tio kompreneble povis okazi; eĉ plie, por eviti ĉian eĉ plej malgrandan eblecon de konfuzo aŭ malordo, la guberniestro saĝe postulis, ke povu ĉeesti niajn kunvenojn nur la *kongresanoj*.

Tiel al niaj solenaj kunvenoj povis veni nek la barcelona publiko nek la multaj nekongresanaj Esperantistoj de la urbo, kiuj estas tro malriĉaj por pagi la kongresan karton.

Niaj festoj fariĝis tiamaniere tute interesperantistaj, pli intimaj, sed ne malpli ĉarmaj kaj agrablaj.

Mi do sincere ripetas, ke la Barcelona Kongreso estis nova sukceso, triumfo; kaj mi eĉ aldonos, ke la fakto, ke tia bela mondkunveno povis havi lokon en urbo, kiun skuis antaŭ nelonge sanga revolucio, estas nova nerefutebla pruvo de la viveco de nia lingvo kaj de la kuragega sentima fervoreco de ĝiaj partianoj.



Antaŭ ĉio nia danko devas respektplene sin turni al la juna progresema Reĝo de Hispanujo, kiu ĉiumaniere montris sian grandan simpatian al nia entrepreno.

Jam antaŭe li estis akceptinta la honoran prezidantecon de nia kongreso, jam antaŭe li, kun sia nobla edzino, ŝia Reĝina Majesto, estis donacinta premion por niaj Floraj Ludoj; kaj apenaŭ malfermiĝis nia kongreso, kiam li faris al ni novan surprizon.

London matene, dum la solena malferma kunsido, la Kongreso decidis, ke saluta telegramo estos sendita al la Reĝo.

Mardon matene D<sup>o</sup> Zamenhof ricevis telegramon de Lia Majesto, salutanta la kongresanojn.

— Sed, sed,... — maltrankvilege krias Pujolà — la telegramo al la Reĝo *ne estas ankoraŭ sendita!!* Neeble, ke li respondis! Ĉu tio ne estas malbona ŝercaĵo de iu farsemulo?

La telegramo ne estis ŝercaĵo.

La Reĝo, *neatendinte nian saluton*, sendis al ni, la unua, propramove, sian bonvenan vorton!

Ĉu estas eble imagi pli afablan konduton?

Kiam lin trafis nia telegramo, la Reĝo resendis duan dankantan depeŝon.

Kaj fine, por belege kroni sian amikan agadon, la Reĝo, kiel ni jam anoncis, ornamis la bruston de nia kara Majstro per la fama

ordeno de Isabelo la Katolika, donante al li la titolon de Komandoro.

Alfonso XIII<sup>a</sup>, Vi, tre katolika Reĝo de Hispanlando, Vi donis al ĉiuj Regnestroj de la mondo, al ni respublikanoj, al ni diversreligianoj, al ni liberpensuloj, plej belan ekzemplon de toleremeco kaj progresemeco; la sorto volu, ke dum via tuta reĝado, kiun ni deziras tre longa, Vi faru nur tiajn homamajn agojn, tiajn noblajn gestojn.



Sur mia tablo kuŝas, dum mi skribas tiujn liniojn, la plena kolekto de la gazeto « La Publicidad », kiu dum la kongreso estis nia oficiala ĵurnalo, kaj ĉiutage presis artikolojn en Esperanto. Sed tiu gazeto ne estis la sola. Ĉiuj en la urbo : la *Veu de Catalunya*, *El Poble Catalá*, *El Diario*, *Cucut*, *Actualidad*, kaj la ilustritaj ĵurnaloj aperigis, pli-malpli ofte, tre favorajn raportojn. Tamen *La Publicidad* meritas apartan citon ne nur, ĉar ĝi uzis nian lingvon, sed precipe tial, ke tiu gazeto estis antaŭe energia kontraŭbatalanto de Esperanto, ke ĝi publike kónfesis sian eraron kaj fine *propromove* sin proponis, kiel oficialan infirmilon de la kongreso.

Jen vere notinda sukceso! Ĉiuj niaj nunaj malamikoj pripensu tiun ekzemplon!

Sabaton, 4 de Septembro, je la kvina, kvar oficialaj urbaj kaleŝoj, antaŭ-kaj post-irataj de municipalaj rajdistoj en festaj uniformoj, venas serĉi ĉe la hotelo Colón D<sup>o</sup>n Zamenhof, la konstantan komitaton de la kongresoj kaj la estraron de la Akademio por fari oficialajn vizitojn unue al la Urbestro, la *Alcalde*, S<sup>o</sup> Francisco Layret, en la urba palaco, due al la prezidanto de la provinca deputitaro, S<sup>o</sup> Tona y Xiberta, en la palaco de la Deputacio, trie al la Generalo, komandanta la urbon, kaj fine al la civila guberniestro S<sup>o</sup> Crespo Azorin. Ĉie la akcepto estis plej afabla, la urbestro kaj deputitestro nin salutis kun vortoj de sincera amikeco, la generalo nin akceptis en siaj luksaj salonoj en granda uniformo kun plej nobla soleneco; kial do la guberniestro, kvankam ĝentila, igis nin atendi en vestiblo, kvazaŭ ni estus neatenditaj vizitantoj, kaj fumis sian cigaredon dum la akcepto? Cigaredo sur la lipoj dum oficiala vizito ŝajnas, al ni Norduloj, iom « shoking ». Tio eble dependas de la latitudo.

Kiel ajn estas, la lokaj aŭtoritatoj, la urba konsilantaro, la urba Gvardio kaj ĝia ĉarma ĉefo S<sup>o</sup> Manuel Ribé y Labarta, la Societad de atraccio de Forasters, la klubo Ateneo Barcelones, la diversaj sportaj Asocioj, per sia frata, varmega, ĉiam pli kaj pli entuziasma helpado kaj gastigado, plene pruvis al ni, ke la latitudo de Barcelono estas tre suda, ke tie la koroj estas varmaj kaj la festoj brilaj, kiel la suno sur la blua ĉielo.

Ĉion rakonti mi ne povas; mi nur skizos.

Dimanĉon, 5 de Septembro, matene, D<sup>o</sup> Zamenhof ĉe la supra etaĝo de l' palaco de Belartoj akceptis la salutojn kaj manpremojn de l' alvenintaj kongresanoj. Malsupre en la granda halo la urba konsilantaro donis feston al geknaboj, revenintaj de libertempaj kolonioj. Baldaŭ

ambaŭ solenoj kuniĝis. Katalunaj geknaboj kaj ĉiulandaj Geesperantistoj interfratiĝis; kaj la popolo, la urba konsilantaro ovaciis nian Majstron, kiam li suriris la estradon de l' halo. D<sup>o</sup> Fuster per elekventa improvizado prikantis la noblecon de nia idealo, kaj, dum li flame proklamis sian kredon al Esperanto, pasis vera ĝojtremo en la koroj de la entuziasmigitaj aŭskultantaro.

De nun la urbestro, la urbaj konsilantoj senĉese partoprenos niajn oficialajn festojn.

En la solena malferma kunsido, lundon matene, sidis ĉe la dekstro de D<sup>o</sup> Zamenhof, la alcalde, kiu plej kore al ni deziris bonvenon. Merkredeon la urba konsilantaro kaj provinca deputitaro prezidis nian feston de l' Floraj Ludoj. Vendredon, 10 de Septembro, ĉe la bicikled-kurado en la parko, dum la bela internacia balo en la palaco de Belartoj, la urbestro oficiale asistis kun siaj konsilantoj nian estraron.

Cetere ni baldaŭ klare vidis, ke tiu konstanta amikeco de la Urbo ne estis nur esprimo de ordinara ĝentileco, sed vere sincera *dankemeco* al la Esperantistoj.

Barcelono ja estis malbenita urbo! La teruraj, kaj ofte malveraj, rakontoj, kiujn la tutmonda gazetaro dissemis, fortimigis ĉiujn vojaĝantojn. Oni evitis tiun malfeliĉan urbon, kvazaŭ ĝin atakis la pesto! Kaj la urbanaro mem, kutime tiel moviĝema kaj vigla, estis kvazaŭ funebrigita.

Venis la Esperantistoj kaj kun ili radio de ĝojo kaj espero.

Kiu nun kuraĝos pretendi, ke Barcelono estas vera vulkano; kiam en ĝi pace kaj gaje, kunvenis miloj da Esperantistoj? Nenio pli bone, pli trafe, povis pruvi la efektivan trankvilecon de la urbo: kaj la urbanoj, rekuragigitaj, reprenis sian vigecon; la *rambloj*, iom dezertigitaj, repleniĝis de gaja promenataro; la teatroj, koncertoj, kinematografoj remalfermiĝis. Barcelono, dank' al la Esperantistoj, fine retrovis sian normalan staton.

Oni nun komprenas, kial la barcelona gazetaro tiel favore raportis pri nia agado, kial la urba konsilantaro tiel dankeme kaj frate nin akceptis, kaj fine decidis improvize nin inviti al familia vesperkunveno, sabaton 11 de Septembro, por kore nin adiaŭi kaj nin regali per xeres, ĉampano, kukoj, fruktoj, tuta lunĉo donita al la mil kongresanoj.

Mi, ho ve! ne gustumis la lunĉon.

Dum ĉiuj ceteraj kongresanoj festenis, mia bona amiko Ernest Archdeacon kaj mi, ni faris kune paroladon pri flugmaŝinoj en la luksa salono de l' Akademio de l' Sciencoj antaŭ sciencula elektitaro.

Kiam mi alvenis je la dek-dua nokte, ĉio estis elmanĝita. Anton Grabowski, plendante mian sorton alkuris kun du bulkoj.

— Amiko, — li diris, — amiko jen mi por vi zorge konservis ion!



Oni senkulpigru min, ke mi ne multe parolos pri la diversaj festoj. Mi devas konfesi, ke mi, ĉu pro laciĝo ĉu pro premanta laborado, ne povis ilin ĉeesti.

Mi nur per rakontoj eksciis, ke ili bele sukcesis.

Gaja ekskurso al monto Tibidabo, kien multaj grimpis per la ĉarmaj

deklivaj vojetoj kaj aliaj per la funikularo. La suno brilis, la imponanta vido ĉiujn ĉarmis, kaj niaj katalunaj amikoj regalis la kongresanojn per spektaklo de la malfacila *Sardano* kaj aliaj pitoreskaj popolaj dancoj.

La Barcelona asocio de Sportoj organizis en la parko kuradon de bicikledo, kaj la feliĉa gajninto ricevis de la mano de nia Majstro belegan pokalon, kiu de nun, sub la nomo « pokalo de Esperanto », ĉiujare pasos de gajninto al gajninto kaj tiel daŭrigos la memoron pri nia Kongreso.

Tre imponantan manifestacion mi ne povas preterlasi.

En la parko de Barcelono estas busto de la fama kataluna poeto Aribau. Verkinte antaŭparolon al pasigrafio de Sinibald, Aribau, kvazaŭ profeto, diris, ke pasigrafio ne povas sufiĉi por la internaciaj interrilatoj, kaj ke la homoj bezonas *buŝan* interkomprenilon, ke li deziras kaj esperas, ke iam venos tempo, kiam la homoj posedos universalan lingvon. La 8 de Septembro, post la ekzercoj de Ruĝa Kruco, la Esperantistoj iris al la monumento de Aribau kaj tie solene, kun permeso de la urbeŝtaro, fiksas sur la piedestalo belan bronзан medalon kun tiu surskribo : « La Esperantistoj dum la V<sup>a</sup> Kongreso al Aribau — Barcelono 1909 ». Kaj dum tiu soleno nia elokventa amiko Pujulà, kun tiu altspirita sentemeco, kiu lin karakterizas, laŭdis la grandan poeton, kiu tiel antaŭdiris kaj divenis la horon de l' kuniĝo de l' homaj popoloj.

En la festa salono de Ateneo okazis du sukcesplenaj paroladoj.

Unue, sabaton 4 de Septembro, nia tre simpatia kaj fervora samideano brazila, S<sup>o</sup> Joao Keating, faris plej interesan raporton pri sia agema lando kun lumaj projekcioj. Jam antaŭ unu jaro, en Parizo, nia amiko Everardo Backheuser faris similan paroladon, kaj mi ne povas pli bone laŭdi la lertan oratoradon de lia samlandano, ol dirante, ke S<sup>o</sup> Joao Keating pruvis al ni, ke Brazilo havas pli ol unu elokventan defendanton kaj porparolanton esperantistan. Disdonado de diversaj broŝuroj pri Brazilo kaj gustumado de bonega brazila kafe superkontentigis la feliĉajn ĉeestintojn.

Merkredon 8 de Septembro, S<sup>o</sup> Louis Carlos tre lerte parolis pri la grandegaj progresoj de Esperanto en la presistaro, pri la tre kontentiga statistiko de la esperantistaj presejoj kaj pri la servoj jam faritaj de Esperanto al la kompostistaro. S<sup>o</sup> Carlos estas jam de longe konata, kiel fervora Esperantisto, li tiel plie montris, ke li estas ankaŭ elokventa konvinkanta oratoro, kiu plej flue uzas nian lingvon.



Kiel ajn interese estus pli longe paroli pri niaj festoj, mi devas ĉesi por paroli pri pli grava temo.

La Barcelona Kongreso, sen ia dubo, havas tre gravan signifon, ĉar ĝi montris tre rimarkindan paŝon sur la vojo de serioza laborado.

Ĝis nun niaj ĉiujaraj mondkunveno estis precipe nur pli-malpli bruaj manifestacioj, kaj eĉ troviĝis kelkaj samideanoj, kiuj pretendis, ke niaj kongresoj devas nur esti tiaj. Oni diris, ke en kongresoj oni ne povas, ne devas *labori*, sed nur amuziĝi, ke neniu estas rajtigita por paroli pri gravaj temoj, ke nenio povas tie konkludiĝi, k. t. p.

La Kvina Kongreso pruvis, ke fine la esperantista popolo estas matura

por bona organiziĝo, ke, kiam la bruemuloj estas silentigitaj, ĝi estas kapabla agi kiel vera parlamento, ke pasis la tempo de l' senordo kaj sonoris la horo de l' regula unuigo.

En niaj ĝeneralaj agadaj kunsidoj, oni vere laboris, kaj ĉiuj, kiuj ĉeestis aŭ kiuj raportis en gazetoj, kun ĝojo konstatis la regulecon, laŭ kiu, kiel en vera parlamento, la oratoroj sinsekve parolis. eĉ, por eble ankoraŭ pliigi la similecon kun reala parlamento, troviĝis du, tri malpacemuloj, kiuj, dum la grava kunveno de l' 9 de Septembro, blekis por malhelpi ĉian diskutadon. Sed felice ili ne sukcesis, ĉar la tempo de l' kriegado estas for. La samaj, kiuj aranĝis dum la Boulogne'a Kongreso tiun strangan kabalon, kiu per sia senĉesa bruado malhelpis ĉiun firman decidon, kiu malebligis ĉian diskutadon, kiu eĉ, por triumfigi siajn personajn dezirojn, ne timis akre ataki en gazetoj nian karan Majstron, tiuj samaj estis eble pretaj por rekomenci la saman obstrukcon.

Sed ilia kondukantaro ne estas plur kompleta; kelkaj ĉefoj malaperis el la esperantista horizonto.

Jam delonge, en multaj okazoj, Esperantistoj esprimis la deziron, ke ĝenerala intersocieta organizo internacia estu starigita. Tiun ĉi jaron, de diversaj flankoj, la Konstanta Komitato de la Kongresoj ricevis denove insistajn petojn pri tiu demando, kaj, speciale, kiel mi jam diris en antaŭa artikolo pri niaj oficialaj institucioj, la grava Nordamerika Asocio esprimis la deziron, ke niaj kongresoj precipe konsistu el oficiale rajtigitaj delegitoj de la propagandaj societoj, kaj komisiis siajn reprezentantojn prezenti tiun proponon al la Kvina.

La Konstanta Komitato do zorgis esploris la demandon. Post unua prepara skriba interrilatiĝo, la membroj de la komitato, kiuj estis en Barcelono, nome G<sup>alo</sup> Sebert, S<sup>oj</sup> Bourlet, Pujulà, Mudie, Mybs, Reed kaj Sabadell interdiskutis dum kvar tagoj kun D<sup>o</sup> Zamenhof kaj R<sup>o</sup> Boirac la proponotan temon.

Mankis nur K<sup>o</sup> Harvey, K<sup>o</sup> Pollen kaj D<sup>o</sup> Schramm, kiuj cetere jam skribe estis aprobintaj la ideon. Tiu tre zorga studado naskis projekton de starigo de internacia reprezentantaro de la ĉiulandaj propagandaj Societoj Esperantistaj, proporcie je ilia multmembreco, kies rolo estus reprezenti tiujn societojn en okazoj de ĝenerala intereso kaj zorgi pri la financaj rimedoj necesaj por la funkciado de niaj oficialaj institucioj (Lingva Komitato, Akademio, Konstanta Komitato de la Kongresoj). Kompreneble tiu reprezentantaro tute ne rajtus sin okupi pri lingvaj demandoj, kies solvo apartenas al la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio.

Por eviti ĉian eblan malpacon, kaj esti certa, ke ĝi interkonsentas kun la plejmulto de l' Esperantistaj Societoj, la Konstanta Komitato de la Kongresoj, antaŭ ol prezenti tiun tekston al la kongresanaro, kunvokis, merkredon 8 de Septembro, ĉiujn naciajn delegitojn.

Ĉiuj naciaj delegitoj ĉeestintaj tiun kunvenon, krom unu, *aprobis tiun projekton*.

Oni do prave povis supozi, ke, en la jaŭda venonta kunsido, la teksto estos tuj akceptita sen ia malfacilaĵo.

Apenaŭ malfermiĝis, jaŭdon matene, la agada kunsido, kiam, *antaŭ ol la teksto de la propono estis legita kaj klarigita*, sin enskribigis jam ora-

toroj, dezirantaj kontraŭparoli! Post kiam la ĝenerala sekretario de la Konstanta Komitato plene klarigis la motivojn de la projekto, rakontis la zorgan antaŭpreparan laboron kaj legis la tekston, tuj venis unu el la kontraŭparolantoj, kiu *legis* tute pretan oratoran pecon, per kiu li sciigis al ni, ke minacas nin gravega danĝero, ke la oficiala reprezentantaro de niaj propagandaj Zamenhofaj Societoj kondukos nian aferon al pereco, k. t. p!

Vere, ne estas necese respondi tiajn strangaĵojn; sed tiu neimagebla diskutado estas, laŭ mia persona opinio, la plej bona kaj nerefutebla pruvo de la nepra utileco de starigo de oficiala rajtigita delegitaro.

En tiu mateno ni laŭvice aŭdis unuflanke eminentajn reprezentantojn de gravaj naciaj societoj, kiuj venis defendi la proponon, dum aliflanke ĝin kontraŭbatalis nur *izolitaj* perscnoj. Ĉu estas eble, ke la parolo de la prezidanto de la Germana Asocio estu egalpezita per la opinio de iu izolita kongresano, kiu nur parolas en sia propra nomo? Ĉu estas akceptinde, ke la laborado de tuta kongreso povu esti malhelpata de kelkaj malpacemuloj, kiuj havas laŭtan voĉon por kriegi kontraŭ tiuj, kiuj ne plaĉas al ili, kaj larĝajn manojn por tondre aplaŭdadi siajn kunulojn?

En la « Oficiala Gazeto » oni legos la detalan raporton pri tiuj diskutoj, mi nur volis ĉi-tie doni mian privatan impreson.

Laŭ proponoj de S<sup>oj</sup> Privat kaj Cart, oni prokrastis la voĉdonon, kaj fine dum la ferma kunsido, sabaton 11, la kongreso akceptis unuanime la sekvantan tekston :

*La Kvina Kongreso de Esperanto esprimas la deziron, ke la diverslandaj societoj por la propagando de Esperanto, kreu per proprocia balotado, Internacian Konsilantaron, por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj (Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj).*

*En tiun konsilantaron, oni elektos po unu ano por mil anoj de propagandaj societoj.*

Tiel esperantista konsilantaro estos nun starigita. Ni ĝoju pri tiu unua bona rezultato.



Flanke de niaj ĝeneralaj kunsidoj okazis tre interesaj fakaj kunvenoj. Ili estis, ĉi-tiun jaron, malpli multenombraj ol antaŭe, sed en ili oni multe pli esike laboris.

Antaŭ ĉio apartan citon ni ŝuldas al la bela ĝenerala kunveno de la *Universala Esperanta Asocio*.

Ne estas necese, ke mi ĉi-tie parolu pri la gravaj servoj al ni faritaj de tiu grava asocio tiel lerte kondukuta de sindonemaj viroj, kiel Mudie, Hodler, Th. Rousseau, Schmid, D<sup>o</sup> Kandt, k. c.

La celado de la Esperantistoj estas duobla.

Unue niaj naciaj *propagandaj* Societaj sin okupas pri la ĉiulanda konigo kaj disvastigo de nia lingvo. Ili per paroladoj, gazetoj kaj broŝuroj varbas novajn adeptojn. Ili organizas kursojn kaj kunvenojn por instrui Esperanton. Ili tiel kreas la armeon de la Esperantistoj.

Sed, kiam la propagandaj societoj konigis Esperanton al novaj varbitoj; kiam ĉi-tiuj scias la lingvon, ili sin turnas al ni, kaj demandas :

— Nun mi lernis la lingvon. Kion mi faros per ĝi? Kiamaniere ĝi al mi utilos?

Kaj ni respondos :

— Turnu vin al la specialistaj praktikaj societoj, kaj precipe aliĝu al U. E. A., kiu havas multnombrajn delegitojn, kiu helpos vin per Esperanto.

La propagandaj societoj sin turnas al la *neesperantista* publiko por ĝin rekruti, la aplikaj societoj, U. E. A, Teka, katolika, marista, jurista asocioj sin turnas al la *Esperantistoj*.

La unuaj societoj alportas anojn al la duaj, sed la duaj pravigas la ekziston de la unuaj.

Tiel, apogante sin unuj sur la aliaj, la propagandaj Societoj kaj la praktikaj asocioj, kune laborados al komuna entrepreno, ĉiu konservante sian propran celon, neniuj plugante sennecese la kampon de la alia, kaj tiu saĝa divido de la grandega laboro, kiun postulas nia sankta afero, ĝin kondukos al certa triumfo.

Prave do nia Majstro diris, kiam li prezidis la kunvenon de U. E. A, ke ĝi estas unu el la ĉefaj asocioj en nia anaro, ĉar ĝi plej konvinke pruvis, ne per propagando, sed per konstanta *uzado*, la nedisputeblajn utilecon kaj taŭgecon de nia lingvo.

Mi nur rapide diros kelkajn vortojn pri la aliaj de mi konataj kunvenoj, kiuj vere meritus pli detalan raportadon.

Dank' al la energiaj klopodoj de niaj fervoraj samideanoj, abato Richardson kaj S<sup>o</sup> Claudius Colas, la katolikoj havis tre sukcesplenajn kunsidojn, kaj laste sur la fama Montserrat en emociiga soleneco benigis sian belegan standardon.

S<sup>o</sup> Degon, Ellis, de Lajarte, Sergeant organizis fruktoplenajn seancojn de la Jurista Societo, kiu de nun alprenis *La Revuon*, kiel oficialan organon (vidu la rozajn paĝojn).

Kuracistoj, farmaciistoj, maristoj, fervojistoj eŝike kunlaboris.

En paraninfo, la Scienca Asocio havis sian solenan kunsidon, sabaton 11. Ĝia ĝenerala sekretario, D<sup>o</sup> René de Saussure, kiu tiel malavare ĝin provizas per mondonacoj kaj lerte direktas, faris tre ĝojigan raporton pri la akiritaj rezultatoj. Nova estraro estas elektita, kies prezidanto estos S<sup>o</sup> Huntington el Harvard College (Usono).

Fine mi ne rajtas forgesi la junulojn. En nia franca lando aperis juna entuziasma apostolo, S<sup>o</sup> Ferdinand Duviard, kiu per nelacigebla klopodado sukcesis revigligi la fervoron de l' jam ekzistantaj junulaj grupoj, fondi novajn, kaj fine starigi federacion de la junulaj societoj francaj, kies organo estas la bonega ĵus aperinta nova gazeto *Juneco*.

Helpita de sia juna lerta amiko S<sup>o</sup> René Pichon, li organizis du tre interesajn kunvenojn de junuloj, kiuj certe naskos tre gravajn iniciatojn en la junula parto de niaj rondoj.

Jen movado, kiu havas tute apartan signifon, ĉar, kiam la ĉiulandaj lernantoj propravole inter si organizos sian propagandon, la fina venko de Esperanto estos certa.



Inter ili mi apenaŭ kuraĝas kalkuli nian amikon Privat, kiu, kvankam li gaje festis dum la kongreso sian dudekan jaron, ja estas jam malnova viriĝinta Esperantisto. La *Instituto*, kiun li fondis, perfekte funkciis dum la kongreso. Okazis ekzamenoj kaj disdonado de diplomoj, dum kiuj nia elokventa samideano faris unu el la plej lertaj paroladoj, kiujn oni iam oratoris. Mi vere bedaŭras, ke ne restas loko por citi tiun altsentan literaturecan deklamadon, en kiu li montris, kiel Esperanto ŝuldas sian vivon malpli al siaj simpleco kaj perfekteco, ol al la *interna ideo*, kiu flamas en ĉiuj koroj de la Esperantistoj per la fajro ekbruligita de nia nobla Majstro.



Mi certe multon forgesas, kaj tamen mi jam tro longe babilis.

Mi do haltas.

Sed restas agrabla devo, restas, ke mi ŝuldas korajn dankojn al niaj katalunaj amikoj, al nia agema prezidanto Frederiko Pujolà, kiu tiel dece ĉion direktis kaj prezidis.

Mi jam diris, kiajn laŭdojn li kaj lia laborema gracia edzino meritas; sed mi ne povas ne ankoraŭ ripeti, kiom dankemaj ni devas esti por la plenumado de tiu malfacilega organizado.

Nur laŭdajn vortojn mi aŭdis pri la bonega aranĝado de la malkara loĝado, kiun faris nia servema samideano S<sup>o</sup> Claramunt.

S<sup>o</sup> Alfonso Sabadell, kiu ludis speciale la delikatan rolon de reprezentanto de la Kongresa Komitato apud la registaraj aŭtoritatoj, D<sup>o</sup> Bremon y Masgraŭ en la propaganda fako, S<sup>o</sup> Balmes en la festoj, kaj S<sup>o</sup> Balsells, akurata kasisto, ĉiuj kune, neniuj malpli ol la alia, ricevu kaj akceptu la koran esprimon de nia sincera dankado.

Iliajn nomojn ni enskribos en la *Ora Libro* de Esperanto.

CARLO BOURLET.

### Ruĝa Kruco.

La merkredon 7 de Septembro, sub hele blua ĉielo, en alloganta herbejo, meze de la granda Parko, okazis la ekzercado de la Ruĝa-Kruco. Kiel en Dreseno, tiujn eksperimentojn oni faris por montri la utilecon de Esperanto sur la militkampoj. Ĉio estis lerte antaŭzorgita. Jam de kelkaj tagoj, Generalo Priou, la sindonema Prezidanto de Esperanto Ruĝa-Kruco, ĉiutage, jen en la hotelo, jen sur la Rambla, jen en la teatro, kaj post la agadaj kunsidoj, alparolis ĉiujn amikojn per tiuj strangaj vortoj:

— Ĉu vi bonvole konsentos ludi rolon de vundito? Ne malakceptu! Tio estos tre interesa. Eble oni detranĉos al vi ĉu la brakon, ĉu la piedon, eble ankaŭ oni serĉos en via brusto kaŝitan kuglon... tio estos al ni tre utila....

Kaj, ĉar, iom surprizitaj de tiu neordinara propono, la apostoloj de Esperanto ŝanceliĝis, dezirante neniamaniere kroni sian kapon per la martira aŭreolo, la Generalo aldonis kun ruza kaj sprita rideto :

— Nenion timu, vi ne bedaŭros vian penon.

Multaj do konsentis, kaj je la horo montrita la granda herbejo de l' Parko, subite aliformigita en vasta militkampoj, prezentis la plej interesan spektaklon.

Tie ĉi, kaj tie, kuŝas la bonvolaj vunditoj, inter kiuj ni rekonas sinjorojn Borel, Chaussegros, de Lajarte, Poulard, D<sup>ro</sup> Arnhold, Aymonier, Duviard, Colas kaj aliaj kongresistoj : anglaj, germanaj, hispanaj, katalunaj, ktp. ; ili atendas senpacience sub la varmega suno, ke la eksono de l' trumpetistoj montru la komencon de la ekzercado. Obeante al la signalo konsentita, tuj aperas la barcelonaj flegistoj, vestitaj de katuntolaj kostumoj kun blankaj kaj ruĝaj strioj. Ili kuras, alkondukante la portilojn, kaj, post malgranda esperanta interparolado kun la vunditoj, alportas ilin ĉe la panslokono. Tie D<sup>oj</sup> Artigues, Puig kaj Goloron ekzamenas ilin, kaj eltirante slipon el la poŝo, rapide enskribas sur ĝi la specon de la vundo. Poste la portistoj zorge portas la malsanulojn ĝis la eniro de la tendo, perfekte aranĝita kaj provizita de ĉiuj kuraciloj. Jen Doktoroj Bremon, Dor, Fromageot, Pamard, Vaucaire, sindoneme helpitaj de la farmaciistoj S<sup>oj</sup> Borson, Péloille, Rousseau, akceptas la vunditojn. Jen ĉarmaj flegistinoj sin afable klinas super la malfeliĉuloj kaj per mildaj vortoj ilin konsolas pri ilia kompatinda sorto. Inter ili S<sup>inoj</sup> Duviard, Marcelle Tiard, de Galliez, Royer, Lefèvre, F<sup>inoj</sup> Charlotte Pulvers, Vannay, Vivette Adam, Blanc, Gérard, Dizier, kies sindonemo egalvaloras la afablecon, senhalte rondiras sub la ravitaj rigardoj de la Prezidantino de la Regiona Ruĝa-Kruco S<sup>ino</sup> Rosa Alier akompanata de la virina stabo S<sup>inoj</sup> Viudad de Sanz Selma, Pujal, Estansen, de S<sup>o</sup> Montaner, delegito de la Ruĝa-Kruco de Katalunujo kaj de kelkaj hispanaj oficiroj. — Ĉiuj konsentas nun pri la nediskutebla utileco de Esperanto kaj promesas ĝin lerni kaj konigi. Multaj homoj amase premitaj unu kontraŭ la alia, malgraŭ la varmo, malgraŭ la suno, ĉeestis ĝis la fino de la ekzercadoj kaj tiamaniere montris la grandan intereson, kiun naskis la enkonduko de Esperanto inter la ruĝ-krucanoj, kaj tio pruvis al la skeptikuloj kaj al la promenantoj venintaj por kontentigi sian scivolemon la alte noblan celon, kiun nia lingvo povas atingi en tiu homama fako.

Baronino DE MÉNIL.

### Mistero de Doloro.

Ĉiujare la teatra prezentado estas unu el la kongresaj festoj la plej atendataj, plej ŝatataj, plej aplaŭdataj. La prezentado de *Ifigenio* en Dresdono laŝis al la kongresanoj neforgeseblan memoron; la membroj de la 5<sup>a</sup> kongreso en Barcelono ne pli forgesos la dramon originalan, kiu estas prezentita antaŭ ili. La pasintan jaron estis ludita klasika ĉefverko,

fama pro la klasika beleco de la formo, de la versoj, kiun revivigis la genio de Goethe. Tiu teatraĵo iamaniere estis vere internacia, ĉar la antikvaj verkoj apartenas al ĉiuj kaj nutris, nutras ankoraŭ, la homan spiriton. Ĉiuj kulturitaj spiritoj ŝajnis do pretaj, por kompreni tian verkon. Tiun ĉi jaron la Katalunoj, fieraj pri sia lando, pri sia renoviĝanta literaturo, antaŭmetis antaŭ internacia publiko la verkon de juna aŭtoro el Katalunujo, profunde kaj decide nacian. La entrepreno estis aŭdaca; ĝi estis kronita de triumfa sukceso. Ĉiuj ĉeestantoj estis dankaj, ke ili pli funden penetris en la originalan karakteron de tiu ĉi popolo.

Mi proponas al vi, kaj mi petas, ke oni proponu al kontraŭuloj de Esperanto, tiun observon. Nia lingvo, kiun oni pretendas malamiko de naciaj lingvoj, kiu malaperigos ilin, kiu forigos la nuancojn tiel diversajn de la produktaĵoj de la homa spirito senfine riĉa, kiu malhelpos, ke oni komprenu la diversecon de karakteroj kaj temperamentoj naciaj, nia internacia lingvo konigis, komprenigis al homoj el ĉiuj partoj de la mondo, verkon profunde nacian, kaj tiu verko estas tradukita kun plena inteligenteco de la koro kaj de la spirito de Kataluno, S<sup>o</sup> Pujulà y Vallès, ludita kun plej sincera senartifikeco, plej ĝoja fervoro de aktoroj katalunaj, fratoj de la personoj, kiujn ili prezentis. Vi povas traduki la verkon en francan, germanan lingvon, vi povas ludigi ĝin de aktoroj de la « Théâtre français » aŭ de « Lessing's Theater », certe la publiko franca aŭ germana neniam ricevos tiel fortan, tiel ĝustan impreson, kiun ricevis la kongresanoj en tiu teatro Romea!

La aŭtoro, S<sup>o</sup> Adrià Gual, en parolado varma kaj elokventa, kiun legis S<sup>o</sup> C. Bourlet, kaj kiun aklamis entuziasme la ĉeestantoj, montris bone la altan celon de tiu prezentado kaj la senlimajn konsekvencojn, kiujn la imago povas antaŭvidi aŭ esperi. Ni tuj komprenis, kiom nacia, kiom loka estas lia verko, kiam li rakontis en kiuj kondiĉoj li elpensis, skribis ĝin. Tiu verko havas por li, laŭ lia diro, signifon pli sentimentalana, ol artan. Li estis studento en Parizo; li loĝis en la Latina Kvartalo. Kiam li revenadis de la studejo, li izoligis en sia ĉambreto, kaj li rememradis, rememradis....

*« En tiaj momentoj pasadis antaŭ mia revanta penso senfinaj adorataj fantomoj, kiujn oni ĝuste valorigas nur tiam, kiam oni troviĝas malproksime, nesciante ĝuste, kiam oni revidos ilin. Estis la imagaĵoj de mia familio, de kelkaj amikoj kaj, superfluganta super ili, tiu de virino, edzino mia hodiaŭ. Tiun rozarion de rememoraĵoj sekvis logike la amaso de tiuj, kiuj ne havas difinitan nomon... tiuj montoj, tiu ĉielo, tiu speciala aspekto de la naturo, kiu estas al ni familiara, kaj kiun ni amas per ĉiu flamo de nia koro... tio, kion ni nomas patrujo kaj mi volus nomi per pli vivantu nomo, kiun mia penso ne prosperas elpensi. »*

Por danki sian karan patrujon, al kiu li ĉion ŝuldas, kaj la konsolon en la izolaj tagoj kaj la fortojn en la lukto, kiel en la laboro, li oferis tiun dramon *« kiel la maristo, post la ventego, dioferas al sia sanktulo pecon de ŝnuro, kiel la pastisto faras, el siaj preferaj arbaraj floroj, humilana bukeda. »*

Kun tono de konvinko, kiu forte tuŝis ĉiujn korojn, S<sup>o</sup> Gual diras : *« Ĉu vi komprenas nun mian gojon? Ĉu vi ne vidas klare, ke ĝi nepre devas esti supera? Tio, kio estis verko de mia sincereco, verkita kaj sentita per tiu*

*adorata parolo de li unuaj kanzonoj, kiuj elfalis el patrina buŝo, kiel roso sur mian lulilon, hodiaŭ, dank' al sorto kaj al la laboro de eminenta homo, troviĝos antaŭ floy de ĉi-tie kaj tie, de ĉiuj estos komprenita, de ĉiuj bone juĝita, kaj amita de ĉiuj... almenaŭ pro la bona intenco, kiun ĝi enhavas. »*

Tian ĝojon ĉu vi ne kredas, ke ĉiuj aŭtoroj el ĉiuj landoj volus koni?

S<sup>o</sup> Gual konkludas « *Kiu scias ĉu iam, laŭ ideo montrita de Pujulà, de Katalunujo ne devas elflugi al la tuta mondo la avo da esperantistaj aktoroj, kiuj en triumfa flugado alportus ĉien la sennombrajn belaĵojn de la klasika hispana teatro, rekante samtempe la fortojn kaj la agojn de ĝiaj modernaj aŭtoroj.* »

Bela revo! nur revo! « *Tamen kiu scias? Ni esperu!...* »

Jes, ni esperu, kaj ni estu dankaj al S<sup>o</sup> Gual, ke li donis al ni per sia verko novan motivon esperi, kaj ke li tiel bone komprenis, tiel elokvente klarigis la signifon de tiu prezentado, daŭrontan pli longtempe, ol unu solan vesperon. Jam, kara S<sup>o</sup> Gual, kiel mi plezure diris al vi la morgaŭan tagon de la prezentado, jam vi ricevas la rekompencan de via penado. Via dramo havos pli da legantoj, ol da spektantoj. Ĝi estos legata, ĉie, kie nia lingvo estas parolata. Via nomo flugados sur la lipoj de la homoj, aŭ pli bone, ĉar via ambicio estas pli nobla, la literaturo de via patrujo estos pli konata; ĉie oni parolos pri via kara Katalunujo. Por pli bone konigi vian dramon al tiuj, kiuj ne ĝin vidis, por inspiri la deziron ĝin legi kaj ankaŭ por vin danki pro mia propra plezuro, mi analizos ĝin iom longe.

Mistero de Doloro estas tragedio familia tre simpla, tre kortuŝanta. Ĝi malvolviĝas en kamparana domo, sur alta monto kataluna. La agado estas rapida, senigita je aventuroj komplikitaj, tute enkora, tute en analizo delikata de sentoj, kiel en antikva tragedio kaj, kiel en antikva tragedio, la fatalo kruela, nefleksebla pendas super ĉiuj.

Oni povas ĝin resumi per kelkaj vortoj. Vidvino pli ol kvardekjara, kies haroj jam ekblankiĝas, sed kies vizaĝo restis juna kaj animo ardanta, edziniĝis kun juna homo dudekdekjara, kiun ŝi adoras. Ŝi estas patrino de filino dudekdekjara. Ĉiuj tri vivas kune en la farmdomo. Iom post iom la juna edzo kaj la junulino sentas unu kontraŭ la dua amon, kiun ili kaŝas, kiun ili kaŝas al si mem, kiu atendas nur okazon por eksplodi. Naskiĝis la okazo. La junulino rifuzis krude la fianĉon proponitan al ŝi de ŝia patrino. La rifuzita aspiranto minacas la patrinedzon. Ili batalas, sin vundas negrave. Dum la edzino iras serĉi balzamon por flegi sian edzon, tiu ĉi kaj la filino restas solaj. Ili deklaras al si sian amon, ili sin pasie kisas, karesas. La patrino surprize ekkonas ilian sekreton, kaj, duoble vundita en siaj plej karaj amoj, perdante ĉiun motivon vivi, ŝi sin oferas, sin mortigas, por ke ŝi ne malhelpu la feliĉon de la gejunuloj. Ŝia ofero estos neutila; ŝi ne estos la sola viktimo de la Amo, de la Fatalo. Ŝia morto malproksimigas por ĉiam la gejunulojn, ĉar ili komprenis la misteron de doloro de la patrino, de la edzino malfeliĉa; ilia amo estas krimo.

Mistero de doloro povus egale esti nomita mistero de amo. Parenceco eterna de tiuj du vortoj! En tiuj ĉi animoj simplaj, sub tiu ĉielo varma, en tiuj montoj kun krutaj valoj, kun riĉaj ruĝaj koloroj, la amo havas ion perfortan, malcedeman, voluptaman. Ŝi okupas la tutan animon, plenigas

la tutan vivon de tiuj, kiujn ĝi kaptas. Analizo de karakteroj tion klarigos kaj samtempe la tutan dramon.

*Mariano.* — La viktimo plej suferanta, plej kortuŝanta de la Amo, de la fatalo, estas la patrino, la edzino Mariano. Ŝi suferis, ŝi mortis pro tio, ke ŝi forgesis legon ordonan de la naturo, kiu, zorganta pri sia celo, metas la amon en la koron de la gejunuloj, kaj volas kunigi nur samaĝulojn. La granda poeto, Molière, montris, ne plendante, la mizeron de la maljunulaĉoj, kiuj enamigas por junulinoj kaj estas mokataj kaj ridindaj. Al la viro tamen la naturo donacas eble pli longan amtempon kaj permesas ian diferencon de aĝo. Li amas pli malfrue. Sed, kiam la proporcio estas inversigita, tiam la perforto kontraŭ la naturo estas tro granda. La naturo pli kruele sin venĝas.

Tamen, kiel kompreneble estas, ke tiu ĉi virino ne rimarkis, ke ŝi ne estas plu juna; kiel oni plendas ŝin; kiel en la nuna tempo ŝi estas certa trovi varmajn simpatiojn, nun kiam la literaturo plendas por la rajto al la feliĉo por ĉiu homo! Kaj ĉu por la virino, precipe, la feliĉo ne kuŝas en la amo? Nu, Mariano ne havis sian parton da feliĉo, da amo. Ŝia unua edzo neniam montris al ŝi ian amon; li estis vetludema kaj plie fripono, kiu forportadis la monon de la rikolto por ludi, drinki.... Kaj ŝi estis malsata je tendreco, ŝi suferus ĉiujn malbonojn, la plej grandan teruron, se ŝi trovus vespere, post la ĉiutaga laboro, aman festan buŝon! Ŝi vivis, ŝi maljuniĝis, ne rimarkante. Ŝia koro senigita je tendreco restis juna kaj malsata, kiel la koro de fianĉino. Liberigita per la morto de sia edzo, ŝi sin retrovis, ŝi sin kredis junulino, kaj ŝi amis per ĉiuj siaj fortoj novaj, ne uzitaj, junulon, kiun ŝi ebriligis per varmegaj paroloj, kaj kies amon ŝi akiris. Ŝi do rekomencas sian vivon; ŝi volas, ŝi penadas esti feliĉa; ŝi volas esti amata kaj ĉiam timas ne esti sufiĉe amata aŭ tiom, kiom ŝi mem amas. Ŝi volus ĝui tute sola kun sia Silvestro sian feliĉon, malproksime de ĉiu ĵaluza rigardo, de ĉiuj najbaroj, eĉ de sia propra filino. Senĉese ŝi timas, ke ŝia feliĉo forkuros, ke la fatalo denove obstinege ŝin frapos. Tia amo ŝajnas frenezaĵo, ŝi mem tion konsentas, scias kaj sin ellasas al ĝi kun volupto. Ŝi havas la ardecon de la juneco kaj ankaŭ la naivajn amuzojn. Kiam Silvestro revenas de la laboro, ŝi sin kaŝas por fari al li ŝerceton; ŝi ĵetas al li en la vizaĝon plenmanon da maizo! Samtempe ŝi havas por li amemaĵojn kaj karesojn patrinajn. Ŝi lin nomas « Mia knabo! », ŝi lin dorlotas hejme, kiel infanon.

Nun la sorto ŝajnas esti riparinta sian maljustecon. La patrino amas sian filinon tiom, kiom la edzino la edzon. Ŝia penso iras laŭvice de unu al la dua, ŝi revas vivi apogita egale kontraŭ ambaŭ....

Kia terura vidaĵo subite renversas tiun feliĉon tiel kare deziritan kaj defendatan! Ŝia filino, ŝia edzo pasie kunligitaj! Tiam la kompatinda virino komprenas la fatalon, kiu ŝin premas! Ŝi ŝanceliĝas, hezitas unu momenton pri tio, kion ŝi faros.... Kia dolora batalo en tiu animo vundita, disŝirita de la du solaj estaĵoj, kiujn ŝi amas en la mondo, trompita de sia edzo, kun sia filino! Mallonga batalo! Lumo fariĝas en ŝia spirito. Ŝi estas jam decidinta. Ŝi malproksimiĝas per paŝo firmigita, revenonte tuj. Kun voĉo dolora ŝi kantas melankolian kanzonon, kiun kantis ŝia filino en la komenco de la dramo, kies titolo kaj paroloj rakontas la aventuron

de ŝia filino; ŝi kantas por averti la kulpulojn pri ŝia reveno. Jen la kanzono, kiu eble estis la ĝermo, el kiu naskiĝis la dramo, kaj kiu estas kvazaŭ « leitmotiv » de la tuta dramo.

*Adiaŭ Marianeto, De mia sopir' princin'. Se estus vin ne koninta, Ne mi nun bedaŭrus vin, Ho Marianet', adiaŭ', De mia sopir' princin'.*

*La via amant' ĉe l' pordo, Atendas nur « jes » de vi, La patron ne malĝojigu, Por ke venu ĝoj' al mi, Mi fariĝos ja monaĥo, Ne restos mi tie ĉi!*

Ne estas multaj situacioj pli dramecaj ol tiu, en kiu la tri personoj troviĝas vizaĝo kontraŭ vizaĝo, la edzo kaj la filino, konsciaj pri sia kulpo, tremantaj, ke ĝi estas divenita de la patrino, de la edzino; kaj Mariano, kiu ĉion scias, kiu venkas, kaŝas sian suferon, montras vizaĝon trankvilan... Kian longan, profundan rigardon ŝi fiksas sur Silvestro! Tiu ĉi emociiĝas, konfuziĝas. « *Kion vi havas?* » « *Suferon por vi!* » respondas Mariano. Ŝi ja suferas ne pro la malgrava vundo, kiun ricevis Silvestro, ne eĉ pro ŝia feliĉo rompita, ŝia amo makulita, ŝia vivo perdita, sed ŝi suferas por li pro tiu kulpa amo, kiun li ne povas regi, kiu pereigas ilin tri. Ŝi iros, kvankam jam noktiĝas, tra la intermontoj krutaj, serĉi balzamon, kiu resanigos la vundon de Silvestro. Vane ŝia edzo, ŝia filino kontraŭstaras. Ŝi iros, kaj oni sentas, ke ŝia volo estas nepra kaj la vidantoj divenis kun teruro, ke ŝi iras al la morto, al la abismo. Ni estas impresitaj de kompato kaj de admiro antaŭ tiu volo de sinofero! Kia evidenteco por la spektantoj eliras el ŝiaj lastaj paroloj, kies senco estas duobla, sed kies dusencecon devas ekvidi la konscienco de la kulpuloj. « *Mi volas, ke via malbono ne pligrandiĝu; ĉu vi aŭdas?* (ĉirkaŭprenante lin) *Mi ne volas, mi ne volas ke vi suferu! kaj vi, Marianeto, vi restu kaj flegu lin.* » Dirante tiujn ĉi vortojn, ŝi donas al ambaŭ lastan kison adiaŭan. Ili vane penadas por ŝin restigi « *Mi decidis; vi suferas, kaj tion vi ne volas al mi diri. Mi volas doni al vi la resanigilon; nur mi povas ĝin doni al vi.* » Kaj ŝi diras adiaŭ al ŝia filino, al ŝia edzo, je du paŝoj de la morto, kun rideto sur la lipoj kaj malproksimiĝante ŝi jetas al ili « *ĝis revido; ĝis revido!* »

Ne nur ŝi pardonis, sed ŝi volas per ŝia malapero doni al ili la feliĉon, kaj ŝi volas, ke tiu ĉi feliĉo ne estu maltrankviligita de la pento, de ia dubo. Ĝis la fino, ŝi konservas sian sekreton. Ŝi komprenis sian eraron; ŝi sin mem punas.

*Marianeto.* — Kiam la patrino estas freneza, diras Marianeto, la filino ankaŭ devas esti tia kaj pli. Ŝia amo estas pasio nekontraŭstarebla, sovaĝa, kiu konas nek haltigilon nek barilon, kiu sin trudis al la animo malforta de Silvestro, kiu ensorĉas lin per ĉarmo nevenkebla. Pri ŝi, oni dirus, kion Racine diras pri Phèdre :

C'est Vénus toute entière à sa proie attachée.  
(*Venuso tuta alligita al sia kaptajo.*)

Tia flameco, tia volo en la amo igas ŝin timinda, fatala; tia pasio ordonas plej malbonajn decidojn. Marianeto iom konfuzigas la animojn delikatajn, kiujn precipe allogas mildeco kaj eĉ malforteco en virina koro.

De la komenco de la dramo, el ŝia zorgema, fermita frunto, el la rigardo malŝata, kiun ŝi turnas al la patrino karesanta sian edzon, el la respondoj sekaj, sensentaj, maljuste ironiaj, kiujn ŝi faras al sia patrino, el la krudega decidemeco, per kiu ŝi rifuzas, forpelas la fianĉon al ŝi proponitan, oni divenas animon malkvietan, malsanan, kiu havas sian misteron. Ŝia patrino ne komprenas ŝin; ĉu ŝi estus inda je sia patro? Sed la spektanto, kiu rimarkas la rigardojn de Silvestro kaj Marianeto senĉese sin serĉantajn, sin renkontantajn, sin kaŝantajn al la okuloj de Mariano, kaj la konfidon de Marianeto al Silvestro, kaj la fervoron, kun kiu Silvestro defendas Marianeton antaŭ ŝia patrino, kaj la forton, kun kiu li helpas Marianeton kontraŭ la aspiranto, la spektanto divenas, ke sekreta interkompreniĝo alproksimigas tiujn du estaĵojn....

Baldaŭ ili estas solaj. Marianeto kun atentegaj zorgoj flegas la manon vunditan de Silvestro. Subite, tiu ĉi forportita de movo de freneza pasio altiras al si la lipojn de Marianeto kaj donas al ŝi longan kison. La junulino iom da tempo restas senvoĉa, timigita, poste subite ĉirkaŭprenas lin plorĝemante. « Nun mi scias ĉion », ŝi diras. Silvestro tuj rekonsciĝas; li konscias sian kulpon, li konfesas ĝin, li forpuŝas Marianeton. Nun estas tro malfrue. Ŝi sin ligas al li pli mallarĝe; li ne plu sin liberigos el tiu fatala ligo. Nun ŝi scias, ŝi estas certa, ke Silvestro ŝin amas, ke por ŝi Silvestro batalis, verŝis sian sangon. Ĝis tiu momento ŝi ne kuraĝis kredi sian deziron. Nun ŝia revo efektivigis; ŝi estas feliĉa apud li.

Ŝi ankaŭ scias, ke ŝia amo estas peko, morta peko, ke pli bone estus, se ŝi lin ne amus; sed ŝi ne povas regi sian koron. Vane ŝi luktis. Ŝi faradis ĉion eblan por rigardi lin, kiel duan patron; sed, kiam ŝi vidis lin ridetantan al la karesoj de la patrino, ŝi sentis en sia animo strangan ĵaluzecon kaj koleron, multe da kolero. Kiajn noktojn sendormajn ŝi pasigis! Ŝi ploradis, ŝi pensadis pri li; nenia preĝo povus distri ŝian animon, kaj, se okaze la dormo vizitis ŝin, tiam kun ĝi venis pli teruraj sonĝoj.... Tiuj ardantaj paroloj, kisoj, ĉirkaŭprenoj ebriigas fine Silvestron.

La patrino ne estas reveninta. Silvestro estas maltrankvila. Li ne povas eviti pli kaj pli akrajn riproĉojn de konscienco. Li suferas kompatinde. Ni disigu nin, li diras! Ŝi foriru, ilia flamo estingiĝos, ili retrovos la pacon. Tro malfrue! La pasio de Marianeto ekscitiĝis per la kisoj de la antaŭa tago. Iliaj lipoj konservis la guston de kisoj venenigitaj, kaj tiu veneno fariĝis necesa por ili. Kien ajn li iros, ŝi kuros, sekvos lin ĉiam; ŝi ne pensos, pri hieraŭ, pri morgaŭ, sed nur pri nun. Ŝi mortus tuj, se ŝi devus ne pensi plu pri nun. Nenia skrupulo ŝin haltigas. Ne parolu al ŝi pri ŝia patrino! Patrino mem kondukis Silvestron al ŝi kaj estas pli freneza, ol ŝi. Ilia vivo fariĝos valo de larmoj; sed ĉio estas bela kun la amo.

Iom post iom ŝi lulas, endormigas la timojn, la antaŭsentojn de Silvestro. Ŝi rekondukas, fiksas lian penson sur ilia amo, ŝi transirigas en lin iom da sia amvolo kaj lin kuraĝigas, ke li sin ellasu al la pasio; kaj denove Silvestro fleksiĝas ebriigita de ŝiaj paroloj, de la apudesto de junulino adorata, en la silenta nokto; li imagas feliĉon neeblian, li elvokas bildojn frenezigitajn kaj lia pasio eksplodas per fajraj frazoj, pezaj je volupto. « Mi sufokus vin per forta ĉirkaŭpreno, kaj ni falus teren, manĝante nin per kisoj ». Marianeto kun ĝojego aŭskultas kaj respondas

kun sama ebrieco : « Mi sentus vian bruston sangobatantan sur la mia, kvazaŭ oni min skurgus... »

La koko kantas. Tagiĝas. La kadavro de Mariano estas alportata....

*Silvestro.* — Apud tiuj ĉi virinoj egale pasiaj, egale memvolaj, la viro, kiun ili amas ŝajnas malforta, ŝanceliĝema, kaj tamen li nin kortuŝas, ni lin plendas, ni sentas, ke li estas simila al la mezkvanto da homoj.

Ke li havas malfortan animon, li tro pruvis aŭskultante la amparolojn de vidvino duoble pli aĝa, ol li. La kulpo kuŝas en lia juneco. Li rapide komprenis sian eraron, kiun li ankaŭ elpagos, kiel lia edzino. La konstanta apudesto de junulino en la sama domo, la komparo, kiun li devige faras inter la patrino kaj la filino, la senĉesa tentado, kiun juneco ekzercas sur junecon, baldaŭ malfermos al li la okulojn. La sama allogo, kiu dum unu momento altiris lin al la patrino, pli kaj pli forte, kaj pli nature altiros lin al la filino. Marianeto estas Mariano juna. Li ne kuraĝis konfesi la veron al la patrino, antaŭ ol edziĝi. Li ne kuraĝas konfesi al si mem la nunan veron. Li ĝuas diskrete la ĉarmon vivi tute apud tiu ĉi junulino, kiun li amas, ne dirante. Sed, kiam aspiranto venas, forportonte ŝin por ĉiam, tiam la ĵaluzeco penetras en lian koron; li ekvidas en la profundon de sia koro.

Silvestro havas animon nature rektan; la sincereco de la amo de lia edzino lin kortuŝas, li lojale faras ĉion eblan por ami ŝin egale, li timas ĉagreni ŝin, li ne konsentas ŝin trompi. Sed la amo, en kiu la korpo partoprenas tiom, kiom la koro, la amo, kiu kaptas la homon tutan kaj ĵetas la junulojn en la brakojn de la junulinoj, la amo fatala lin ekkaptas. Li luktas, baraktas, falas, releviĝas, denove falas, denove kontraŭstaras, liberiĝas.... Neutila lukto. Plenumiĝos la fatalo. Malforta animo, sed kies malforteco naskiĝas el honoraj skrupuloj! En tiu ĉi batalo inter la pasio kaj la devo, la pasio triumfas, sed ĝis la fino, eĉ venkita, la devo protestas, riproĉas la kulpon, suferigas la kulpulon.

Ni vidis la diversajn okazaĵojn de tiu batalo, la vanajn klopodojn de Silvestro por forkuri for de tiu ensorĉanta, malbenita pasio. La konscienciproĉo neniam lasas lin kvieti. Ĝi elstaras el mezo de karesoj. La penso al la devo, al la edzino, ĉiam disigas lin de la junulino.

En la fino, dum la ŝentento de la nokto, lia tremanta animo sin ellasas pli kuraĝe al la amo. « Kial ne estas ĉiam nokte? » Jes, por ke li ne vidu klare en sia konscienco! Sed la tago, la lumo venos, jam estas veninta, kaj lumigas la abismon, en kiun lia kulpo deĵetis Marianon. La lumo farigas ankaŭ en lia spirito. « Ĝi nin vidis! »

Tro malforta Silvestro! La kanzono de Marianeto nun resonas malgaje al liaj oreloj. « Mi fariĝos ja monaĥo, ne restos mi tie ĉi. »

Jen tiu dramo tre kortuŝanta, skribita en lingvo rapida, rekta, sen deklamaĵoj, sen vanaj ornamaĵoj, lingvo vere teatra, tradukita de homo teatra ankaŭ. La teksto ĉiam adaptiĝas ĝuste al la sento, al la gestoj. Neniu laŭdo estos sendube pli agrabla al nia amiko Pujulá.

La dramo estis ludata kun fervoro, kun pasio kaj kun tia vereco, ke ne estis eble dubi, ke Esperanto estas la gepatra lingvo de la aktoroj, aŭ ke Esperanto estas vere vivanta lingvo, mirinde fleksebla kaj egale harmonia. Nun estas farita definitiva pruvo! Aktoroj katalunaj, lerninte Esperanton



dum unu aŭ maksimume du monatoj, ludis en Esperanto, parolis Esperanton, kiel sian propran lingvon, t. e., kun eksterordinara rapidegeco, en dramo plej pasia, kaj sekve necesiganta plej rapidan elparoladon, kaj tiuj aktoroj estis perfekte komprenitaj de ĉiuj. Certe ili bone meritis la aplaŭdojn senfinajn, per kiuj ili estis akklamataj post ĉiu akto. En la fino, aŭtoro kaj aktoroj estas laŭlitere supersŭtitaj per floroj. La girlandoj, kiuj kuris laŭlonge de la balkonoj estas subite forŝiritaj; ĉiuj manoj vete ĵetis al la triumfantoj la plej bonodorajn florojn de Katalunujo. La scenejo fariĝis tuj vera tapiŝo. Nia Majstro persone gratulis ilin kaj al ĉiu donacis memoraĵon.

Ni ne volas difini rangojn, kompreneble. La fervoro de ĉiuj geaktoroj estis sama, sama estis nia aplaŭdo por ĉiuj. Tamen estu permesite al ni diri, ke S<sup>no</sup> Antonia Baró (Mariano) elfluigis larmojn, verajn larmojn, ke S<sup>o</sup> Carles Capvilla (Silvestro) profunde nin kortuŝis, precipe en la tria akto, ke S<sup>ino</sup> Emilia Baró (Marianeto) estis amantino vere fatala, S<sup>o</sup> Carles Urbez, bela koko vilaĝa vere *ŝpronizita*, ke fine plej malgrandaj personoj bone plenumis sian rolon. Ni deziras, ke ili havu saman plezuron, ricevante tiujn komplimentojn, ol ni havas farante.

CAMILLE AYMONIER.

### La Muziko ĉe la kongreso.

Intence mi uzas tiun titolon por sengrava raporteto pri la festoj de la lasta kongreso, ĉar mi deziras montri la necesecon de Esperanto ne nur en la praktikaj aferoj, sed ankaŭ laŭ la plej alta vidpunkto de la arto pura.

Samtempe Esperanto kaj muziko utilas al si reciproke. La tradukaĵoj bone faritaj de muzikaj tekstoj, eĉ originalaj verkoj, montras konvinkmaniere la belsonecon de nia lingvo, kies propra ritmeco, zorge uzata, povas naski novajn kaj ne antaŭviditajn ritmojn. La vera esperanta versaĵo havas specialan karakteron, kiu kreas poeziplenajn ritmojn, kaj la tempo certe alproksimiĝas, kiam la ĉefaj kompoziciistoj, en ĉiu lando, verkos muzikaĵojn laŭ esperantaj poeziaĵoj, ĉar ili baldaŭ komprenos, kia rimedo por divastigi ilian nomon kaj iliajn verkojn estas Esperanto: tiamaniere ili utilos al nia lingvo, kiu siavice utilos al ili.

Esperanto sendube multe taŭgas por konigi muzikajn verkojn, kompreneble ne la pure simfoniajn muzikaĵojn, sed la verkojn, kiuj bezonas la homan voĉon por esti plene ŝatataj, precipe ĉe la moderna muzikarto, kiu de tridek jaroj ĉesis esti simpla melodio, sed interpreto ĝusta de la sentoj per la vortoj esprimitaj. Multaj kompoziciistoj plendis pri la ne fideleco de la tradukoj, kiujn oni faras koncerne iliajn muzikaĵojn. Mi mem, kiu tute ne parolas la germanan lingvon multe pli ŝatas auskulti la operojn de Richard Wagner germane kantitajn, ol tradukitajn. Kelkajn frazojn, kiujn mi scias parkere, mi absolute ne povas retrovi en la tro ofta ŝanĝo de signifo ĉe la teksto, kiu kontraŭbatalas la muzikan

sencon. Esperanto, per sia fleksebleco, sole taŭgas por traduki ĉiujn kantverkojn. Tion jam pruvis la koncertoj de la kongreso en Dresdeno. Tion oni rimarkigis al mi en Barcelono, post la du koncertoj, kiujn ni havis la plezuron ĉeesti. Ĉar Esperanto, per la uzo de la akuzativo, povas lasi ĉiun vorton en ĝia vico, kaj pie konservi la muzikan akcenton, kiun la muzikverkisto donis al la ĉefaj vortoj de la poeziaĵo, kiun li enmuzikigis.

Cetere Esperanto konigas en la Kongreslando la ĉefverkojn de la aliaj landoj. Mi rememorigas al mi kun plezuro, ke ĉe la koncerto, kiu okazis en la teatro Romea, iu Barcelonano post la bela interpretado, kiun F<sup>ino</sup> Marie Brucker faris de la sceno de *Alcesto* de Glück, diris al mi : « Mi estis tute feliĉa aŭskulti tiun belegan muzikon, kiun mi tute ne konis ». Kaj pri tio mi ĝojas publike gratuli nian francan kantistinon, kiu havis la bonan ideon ludi tiun rimarkindan scenon de la malnova Glück'a opero.

Aliparte Esperanto algajnas multe per tiuj muzikaj provoj. La ne-esperantistaj enlandanoj, kiuj ĉeestas niajn festojn kaj jam konas la kantitajn muzikaĵojn, ne povas fari alie, ol admiri nian lingvon, kiu tiel bone tradukas la nacilingvajn vortojn, kaj ofte, post esperantaj koncertoj, oni parolis al mi pri la belsoneco de Esperanto. Tiu lingvo, tiel belsona, tiel harmoni plena, tiamaniere pruvas perforte, ke ĝi ne estas *jargono*, kiel tion certigas kelkaj malsprituloj.

Do Esperanto taŭgas por muziko, kiu siavice utilas al la propagando de Esperanto. Pri tio la organizaj komitatoj de niaj ĉiujaraj kongresoj estas tute pravaj, kiam ili aranĝas muzikajn kunvenojn, dum la vesperoj liberaj.

Tiun ĉi jaron, la loka komitato organizis du grandajn koncertojn, kiuj ambaŭ multe sukcesis.

La unua okazis la dimanĉon 5 de Septembro en la teatro Romea. La programo konsistis el verkoj de katalunaj kaj francaj komponistoj. Tri francaj kantistinoj, kaj du barcelonaj geartistoj kunhelpis al la koncerto. El la francaj artistinoj F<sup>ino</sup> Marthe Prevost kantis tre lerte la fame konitan arion de *Louise* (Luiz) de G. Charpentier kaj tute mirinde la *Ni'on* de X. Leroux, kun akompano de violonĉelo ludita de S<sup>o</sup> Miguel Julia. S<sup>ino</sup> Decourt ĉarmis la tutan ĉeestantaron per la delikateco de sia alta voĉo de soprano en la valso de *Romeo et Juliette* de Gounod, kaj la *Verda stelo* jam kantita de F<sup>ino</sup> Apitz dum la Dresdena Kongreso, kaj kies versoj estas de S<sup>ino</sup> Marie Hankel, la reĝino de la Floraj Ludoj. Sia bonega dirmaniero estis multe aplaŭdita en la *Stelo de amo* de Felix Bayle, tre interesa verko, kaj *Ciuj okuloj* bela melodio de A. Deutsch de la Meurthe. Tre interesa parto de tiu koncerto estis la ludado de la granda sceno de *Alceste* (Glück) belege kantita de F<sup>ino</sup> M. Brucker, greke vestita kaj en antikva dekoracio, sur kies fono desegniĝis tute arte siaj tragediaj gestoj kaj movoj, sia hieratika sintenado. Tiu sceno multege sukcesis. F<sup>ino</sup> Onia Farga, Barcelona artistino, tre talentege ludis unu el siaj komponicioj *La Moscas de Sant Narcis* kaj la *Pastoreto*, laŭ katalunaj popolaj kantoj. Post multaj aplaŭdoj, ŝi aldonis al la programo tre viglan *Hungaran Dancon* de Brahms. S<sup>ro</sup> Lambert, la talentoplana Barcelona

muzikisto, bonvolis plenumi la penigan rolon de fortepiana akompananto. Oni devas do lin multe gratuli samtempe ol S<sup>en</sup> J. Balmes, kiu estis la organizinto de tiu beleta muzikfesto.

La dua granda koncerto okazis en la Palaco de Belartoj, la mardon 7 de Septembro, kun la afabla kunhelpo de la « Schola Orpheonica » (Orfeona Skolo) de Barcelono. Tiu rimarkinda ĥoristaro, tre arte direktata de la majstro Marcet, kaj konsistanta el tute belegaj voĉoj, el kiuj ni citos la du gesolistojn. Sinjorinon Elissa Gallinat kaj S<sup>en</sup> Conrat Giral, donis al ni du horojn plenajn de arta sento kaj de revemeco. Ni devas dankegi la organizintojn de tiu festo, ĉar ili konigis al ni tre interesan arton, la katalunan arton, kies profunda sento aperas ne nur en la malnovaj popoloj kantoj, sed ankaŭ en la maniero, per kiuj la nunaj Barcelonaj komponistoj ilin ĥore aranĝis. La inspiroj de la kataluna animo retroviĝas en tiuj ofte naivaj melodioj, en kiuj aperas la postsignoj de la araba karaktero, sed tre malmulte, tion mi devas konfesi. Oni sentas en ili arton apartan, kiu tute diferencas de la hispana arto. Tre akra sento de la naturo kaj de realismo ekfloras en tiuj simplaj arioj, kiujn la blovo de tempo ne velkigis. Ĉiujn mi devus citi, se mi volus esti justa. Mi nur rememorigos la *Nit de San Joan* (la Nokto de Sankta Johano) *Els tres Tambors* (la tri Tamburistoj) popola kanto tre bone ĥoraranĝita de S<sup>o</sup> Morera kaj *Montanyes regalades* (Monto Kanigo) ĥoraranĝita de S<sup>o</sup> Sancho Maracco. Estis por mi granda ĝojo ekkoni tiun popolan arton, tute ravigantan. En la programo estis presita la esperanta traduko de la kantitaj popularioj, kaj tio ebligis la komprenon de la kantoj. Jen tre interesa arto, kiu ĉarmis ĉiujn, kaj kiu sen la helpo de Esperanto estus duone fermita por niaj oreloj.

Sed la « Schola Orpheonica » ne nur kantis katalune, sed ankaŭ ruse kaj majorke. Oni multe ŝatis *la Remistoj de l' Volgo* (rusa popolkanto) kaj *Vou-Veri-Vou* (majorka lulkanto).

Ĉe la fino de ĉiu parto la ĥoristaro kantis esperante diversajn verkojn kies unuan aŭdadon oni donis : t. e. la belega himno *Akcepto*, poezio de F. Pujula, muziko de Lambert, la nobla ĥoro *Al la Fratoj* poezio de nia Majstro L. L. Zamenhof, bele muzikigita de F<sup>ino</sup> Onia Farga. Pri la aliaj verkoj kantitaj dum tiu koncerto estas al mi tre malfacile doni mian opinion. Mi nur dankegas tre varme S<sup>en</sup> Marcet kaj lian ĥoristaron pri la vigla ritmo kaj la sentplena akcento, kun kiuj ili kantis la himnon « Espero » kaj la « Festan kanton », poezio de H. Hodler. Tutkore mi ilin gratulas.

La granda orgeno, kiu akompanis tiujn lastajn kvar verkojn estis ludita de la fama Barcelona orgenisto, profesoro Ensebi Daniel.

Mi ne reparolas pri la katalunaj dancoj, kiujn mi jam priskribis en la aŭgusta numero de *La Revuo*, kaj kiujn oni dancis dum la balo. Ŝajnas, ke la admiro, kiun mi sentis post tiuj dancoj estis ankaŭ eksentata de ĉiuj ĉeestantoj. La naiva ĉarmo de tiuj malnovaj dancoj, dancitaj de gedancistoj vestitaj laŭ la malnova enlanda kostumo, estis multe ŝatinda, kaj la dancistaro kondukita de S<sup>o</sup> Raphael Tudo multege sukcesis.

Mi nur diros kelkajn vortojn pri la muzikaj arioj de tiuj popoldancoj kaj pri la stranga orkestro, kiu ilin akompanis. Tiuj arioj multe ŝatas la

minoran modon, kaj de tio ili ricevas iun tute specialan senton de milda malgajeco. Sed ĝi ne estas la orienta malgajeco, la araba melankolio, senfina kiel la senlimaj dezertoj. Ili ne celas traduki la ebenajn sablajn vastaĵojn : ilia sento estas pli alta. Ĝi rememorigas la montarajn solejojn, de kiuj la rigardo pli profunde enpenetras la horizonton sub pura ĉielo. En ĝi eksonas samtempe la akra blovo de l' vento tra la abismoj, la ne-interrompita plendo de la maro, dolĉe murmuranta. Kiu ajn estas la ritmoj de tiuj dancoj, ĉu vigla, ĉu malrapida, ĉu luliganta, ĉu freneziganta, la melankolia melodio reve ritmas la simetrian, senlace rekomenciĝantan, de siaj periodoj.

Stranga orkestro aldonas al ili tre karakteroplenan senton. Malnovaj estas tiuj instrumentoj, kies nomojn neniu povis diri al mi. Ili certe apartenas al la dekutimiĝinta familio de la basetkornoj, lignaj kornetoj, hobojoj de Amoro, ŝalmoj, sopranklarinetoj, kies elnazaj sonoj ne povas kunmiksiĝi kun la medolaj sonoj de la basoj luditaj per kupraj instrumentoj. La grincado de tiuj sonoj, kiuj ŝajnas tute fremdaj unu al la alia, naskas tute ne direblan muzikon, kies impresoj estas eksterordinara kaj tre bone taŭgas por sonigi tiujn specialajn melodiojn. Tio estas stranga postsigno de tre interesa arto, kies malnoveco perdiĝas en la antikvaj tempoj.



Flanke de tiuj oficialaj festoj okazis aliaj kunvenoj, en kiuj la muziko ludis malgrandan rolon. Mi nur citos la vesperkunvenon de la E. V. K. (Esperantista Vagabonda Klubo), dum kiu oni nur aŭdigis verkojn de la klubanoj, kaj fine la Diservo de la 8 de Septembro en la preĝejo « Casa de Caridad ». Al tiuj diservo helpis la bela voĉo de S<sup>ino</sup> Decourt, kiu majstre kantis la *Ave Maris Stella* de Proch, kaj de F<sup>ino</sup> Marthe Prevost, kiu interpretis kun granda animsento la belegan *Panis Angelicus* de Cesar Franck, akompanatan de S<sup>oj</sup> Emilio Bordas (violonisto), Miguel Julia (violonĉelisto) kaj S<sup>o</sup> Daniel, orgenisto. De longe dum la kongreso oni ne aŭskultis tiel artan programon.

Mi estis forgesonta la du vesperkunvenojn, organizitajn de la teatroj « del Bosque » kaj « Novedades » je la honoro de la kongresistoj. La du lirikajn prezentadojn finis la ludado de l'*Akcepto* de S<sup>o</sup> Lambert kaj de nia Himno.

Oni povas rimarki per tiu raporteto, ke, dum la kongreso de Barcelono, la muziko okupis gravan lokon. Ni povis esti tre feliĉaj pri tio, ĉar dank' al ĝi Esperanto disvastiĝis en specialaj medioj, precipe inter la artistaj. Sen la muziko la multnombraj artistoj, kiuj partoprenis tiujn festojn eble ne estus aŭdintaj paroli pri Esperanto, kiun multaj el ili promesis eklerni.

FÉLICIEN DE MÉNIL.

N. B. — Manko de loko devigas nin prokrasti nian raporton pri la belega postkongreso en Valencio. Ni publikigos ĝin en la proksima numero.

## PRI STUDKOMISIOJ DE LINGVA KOMITATO

Dum la Barcelona Kongreso estas aprobita propono, kiun mi faris pri unu labormetodo. Mi intencas precizigi ĝin per kelkaj vortoj kaj helpi la preparon de ĝia praktika efektiviĝo.

Evoluado estas leĝo natura, kiel al vivantaj lingvoj, tiel al Esperanto, kun tiu limigo, ke, same kiel la volo, la racio prezidis la kreadon de nia lingvo, reguligante la instinkton, korektante ĝiajn erarojn, tiel la volo, la racio konservas siajn rajtojn kaj daŭrigas sian agadon, gvidante, instruante, korektante laŭbezone la instinkton, t. e., la uzadon.

Necese estas, ke oni registru konstante kaj ĉiuloke la rezultojn de tiu evoluado, kaj ke oni povu ĉirkaŭrigardi el supre la disvastiĝon de nia lingvo, ampleksanta la vastan mondon. Ju pli disvastiĝas la lingvo, ju pli multiĝas la verkoj de nia literaturo kaj ĉiuspecaj esperantaj skribaĵoj, des pli malfacila fariĝas la tasko konstati, kontroli la uzadon. Unu sola homo ne estas kapabla tion fari. Kiel en ĉiu scienco, oni devas peti helpon de la divido de laboro. Partigita inter pluraj Esperantistoj kompetentaj, la laboro estos rapide, senpene, komplete farita. La kolektita materialo estos transdonita al la Akademio, kiu disponos rezultojn de enketo metode kondukita kaj povos eltiri konkludojn konvenajn.

Rilate al la vortaro, konsciencaj laboroj jam estas faritaj de S<sup>oj</sup> Wackrill kaj Boulet pri la verkoj de D<sup>o</sup> Zamenhof. Ili devas esti, kaj sendube estos, daŭrigataj de la samaj aŭtoroj tiamaniere, ke la tuta verkaro de D<sup>o</sup> Zamenhof estos elstudata, laŭ tiu ĉi vidpunkto. Komprenoble, oni devas studi kun zorgo plej akurata la verkojn de plej bonaj Esperantistoj, konitaj de ĉiuj pro ilia lerteco.

Rilate al la gramatiko, en la libro « Versions », mi kun S<sup>o</sup> Grosjean-Maupin kolektis tre multajn ekzemplojn, eltiritajn el la verkoj de D<sup>o</sup> Zamenhof, kiuj helpas pli malfrue la definitivan starigon de gramatiko.

En la *Oficiala Gazeto Esperantista* (25 Julio 1909), S<sup>o</sup> Evrot, kunigante tiujn du specojn de laboroj, donis modelon de la studoj, kiujn mi proponas, ke oni faru pri niaj libroj, revuoj, ĵurnaloj, k. t. p.

Jen resume la plano adoptita.

- I. VORTARO. — 1. *Unuradikaj vortoj*. 2. *Plurradikaj vortoj*.
- II. GRAMATIKO. — 1. *Artikolo*. 2. *Nominativo*. 3. *Akuzativo*. 4. *Verboj*.
5. *Prepozicioj*. 6. *Konjunkcioj*.
- III. STILO — 1. *Rimarkitaj frazoj kaj esprimoj*. 2. *Frazkonstruo*.

Apud ĉiu frazo aŭ esprimo notita troviĝas ĉiam montrita la pago ĝusta. Tio estas necesa por faciligi la serĉadon aŭ kontroladon.

RIMARKOJ. — I. *Vortaro* : S<sup>o</sup> Evrot klasifikis la vortojn laŭ la ordo de la pagoj de la libro. Tiu ĉi klasifiko estas tre oportuna por rapida kontrolo; sed dua klasifiko laŭ la alfabeto ordo estas necesa. Estus eĉ tre dezirinde, ke la vortoj estu enskribitaj sur slipoj (kaj ĝenerale ĉiuj notoj, frazoj aŭ

esprimoj) de formato unuforma kaj estus do dezirinde, ke ni interkonsentu pri tiu formato, pri tiuj slipoj, kiuj ebligus plej rapidan kolektiĝon <sup>1</sup>.

II. *Gramatiko* : S<sup>o</sup> Evrot notas la ekzemplojn karakterizajn de la ĉefaj gramatikaj reguloj kaj la esprimojn novajn, originalajn, kiuj ne estas en la kutima uzado de la lingvo. La ordo, laŭ kiu estas klasifikitaj tiaj rimarkoj, estas kompreneble la ĝenerale adoptita ordo de la kategorioj gramatikaj. Ne estas timinde, ke oni tro plimultigos la dividojn kaj subdividojn, ĉar ili pliklarigas la raporton kaj plifaciligas la serĉadon. Ekzemple oni povus distingi en la verboj la tempojn, la modojn aŭ la diversajn specojn de propozicioj. Oni povus interkonsenti pri unuforma detala plano de gramatikaj dividoj numeritaj.

III. *Stilo* : Evidente ĉiuj ne rimarkas la samajn detalojn, sed, ĉar pluraj personoj povos fari la saman studon, kio ne impresis unu, eble atentigos alian. Ekzemple, miaparte, mi volonte aldonus specialan parton pri la vortoj uzataj jen en la senco propra, jen en la senco figura (*Li eksplodis per laŭta rido*. Z. Marta); kio liverus al ni tre interesan ĉapitron de ĝenerala filologio.



Nun, kiel organizi tiun konstantan enketon? Mi donas tie ĉi mian vidmanieron, simplajn proponojn, pri kiuj mi petas, ke oni diskutu.

I. La membroj de L. K., samlingvanoj (iafoje, samlandanoj, ĉar pluraj landoj povas paroli la saman lingvon) prenas sur sin la taskon studi laŭ la metodo difinita la librojn aŭ ĉiuspecajn artikolojn skribitajn de iliaj samlingvanoj.

Unu aŭ kelkaj el ili estos komisiitaj por ricevi la laborproponojn, dividi la laboron inter la bonvolaj laborantoj, kolekti kaj transdoni al la prezidanto de la Akademio la faritan laboron.

Ĉiuj membroj de L. K. estos petataj, ke ili sendu sian akcepton de kunlaborado, ke ili montru, kiajn skribaĵojn ili konsentus studi. La plej malgranda laboro havas sian utilon. Nenio estas neutila. Ju pli da kunlaborantoj, des malpli da laboro por ĉiu. Cetere eĉ ekster la L. K. Ĉiu serioza, kompetenta kunlaboranto, ĉiuj seriozaj komunikaĵoj de iu ajn Esperantisto estus dankeme akceptataj.

Eĉ, ĉar okazas, ke, kutiminte kun niaj propraj naciaj idiotismoj, ni malpli rimarkas, ke ili estas nur idiotismoj, estas tute kompreneble, ke iu ajn Esperantisto, el alia lando, ol la lando de la skribinto, rajtas sendi al la L. K. trafajn rimarkojn pri tiuj idiotismoj.

La reprezentantoj de tiuj studkomisioj povos interkonsenti inter si por precizigi, plibonigi la labormetodon laŭ la montroj de la praktiko, por

1. La formato de la slipoj *nepre* devas esti la *internacia* ĉie akceptita tipo de la decimala bibliografio.

2. Eble, iom post iom, ĉiu aŭtoro kutimigos sendi mem al la L. K. la novajn vortojn, la novajn esprimojn, kiujn li konscie uzas, kiujn li juĝas utilaj aŭ necesaj, aldonante la pravigon de siaj novaj vortoj, kiel faris S<sup>o</sup> Moch en la fino de sia traduko de « La Reĝo de la Montoj » (Bachellette). Almenaŭ, kiu uzas novan vorton, devus ĉiam montri en noto la serĉon precizan kaj la radikon respondantan en la ĉefaj lingvoj eŭropaj, pruvante la internaciecon maksimuman de la vorto.

certiĝi, ke ilia enketo ĉion ampleksas. La Oficiala Gazeto estas ilia natura organo.

2. Kiel fari enketon kompletan? Rilate al la revuoj esperantistaj naciaj la laboro estas facila; sed pli malfacila rilate al la revuoj internaciaj, pli kaj pli multaj, en kiuj skribas, unu apud la alia, Esperantistoj ĉiulandaj. Iuj membroj de L. K. estus komisiitaj de la reprezentantoj, ke ili studu la artikolojn de siaj samlingvanoj aŭ samlandanoj en tiu aŭ tiu ĉi revuo. En la nuna tempo, ĉar ni ne estas ankoraŭ tro multaj, ni nin konas sufiĉe inter samlandanoj<sup>1</sup>.

Se tiu labormaniero ŝajnas iom malfacila, estas eble ankaŭ, ke la reprezentantoj de la studkomisioj, laŭ la proponoj de kunlaborantoj, interkonsentinte difinos al pluraj membroj la specialan kaj kompletan studon de tiu aŭ tiu ĉi revuo, klasigonte poste la laborojn laŭ la lingvo gepatra de ĉiu aŭtoro.

Ŝajnas do necese antaŭ ĉio, ke la membroj de L. K., samlingvanoj aŭ samlandanoj, nomu reprezentantojn, kiuj decidos.

Ne estas utile diri, ke tiuj studoj celas nur la komunan lingvon, ne forlasante kompreneble la teknikajn vortojn, kiuj enŝovigas en ĝin; sed la sciencaj, teknikaj revuoj apartenos al specialaj komisioj.

Ni esperas, ke neniŭ miskompreniĝo aŭ miskomprenigo fariĝos pri la karaktero de tiuj laboroj. Tro naiva estus tiu, kiu kredus, ke la materialoj tiel amasigitaj estos tuj oficialigitaj, akceptitaj de la Akademio. Ili estas nur materialoj por laboro, inter kiuj elektos, laŭ scienca metodo, la Akademio. La membroj de L. K. estos nur registristoj de la uzado.

La novaj vortoj, proponitaj de pluraj aŭtoroj, eĉ de D<sup>o</sup> Zamenhof mem, antaŭ ol oficiale esti akceptitaj estos diskutataj, pristudataj, voĉdonataj de la membroj de la Akademio. Ĝis nun, la Akademio sin montris tre singarda; ĝia konduto estas preferinda, ol troa rapideco.

Pri la gramatiko, la stilo, ĝi povos montri la idiotismojn danĝerajn, kiuj minacus ĝeneraligi tie ĉi aŭ tie, atentigi al tiu ĉi aŭ tiu malbona uzado; memorigante la leĝojn de la bona uzado, precizigante la punktojn, kiujn la praktiko montrus ne sufiĉe klaraj; plilarĝigante la toleremecon en iaj okazoj, laŭ la neceso de la praktiko; per unu vorto, ludante la rolon, sian rolon, de aŭtoritato moderiganta, reguliganta la uzadon kaj firmiganta la unuecon de la lingvo kaj la regulecon de la evoluado.

Fine, ĉu estas utile diri, ke tiuj studoj nun proponataj estos nur parto de la laboroj de L. K., ke ĝiaj membroj ankaŭ faros aliajn raportojn, preparos aliajn teoriajn studojn pri iu ajn punkto, aŭ propramove, aŭ laŭ la deziro esprimita de la Akademianoj, estroj de speciala fako?

(*La Revuo, No. 1909.*) CAMILLE AYMONIER.

1. Ĉu ne estus bonega kutimo, nia laŭ ĉiu ajn vidpunkto, se ĉiu skribanto, subskribante sian nomon, montrus al kiu lando aŭ al kiu lingvo li apartenas? Se tia kutimo ĝeneraligus, nia laboro tie ĉi multe plifaciligus.

Le gérant : M. BAEURLÉ.